



František Lorenc se narodil na Štědrý večer roku 1872 v obci Zbyslav u Čáslavi, v chudé rodině mlynářského dělníka. Už v mládí projevoval mimořádné nadání, zvláště při studiu cizích jazyků, které se učil zejména při své každodenní 6km cestě do školy. Za peníze, které mu poskytovala rodina na studium, si kupoval knihy a opomíjel stravu. Mj. následkem toho v šesté třídě kolínského gymnázia musel studium ukončit kvůli známkám tuberkulózy.



rodná obec - naskiĝvilaĝo

František Lorenc naskiĝis dum la Kristnaska Vigilio en 1872 en la vilaĝo Zbyslav ĉe Čáslav en Meza Bohemio (tiam parto de Aŭstrio-Hungario) en la malriĉa familio de muelista laboristo. Jam en sia junaĝo li montris eksterordinaran talenton, precipe en studado de fremdaj lingvoj, kiujn li lernis precipe dum ĉiutaga 6-kilometra vojo al la lernejo. Kontraŭ mono, ricevita de la familio por studado, li aĉetadis librojn kaj neglektis nutrandon. Sekve de tio en la 6-a klaso de la gimnazio li devis fini la studadon pro komenciĝinta tuberkulozo.



Jako 18letý chudý student, který si přivydělával redaktorskou činností a doučováním, z vlastních prostředků vydal v r. 1890 v tiskárně Hoblík v Pardubicích PRVNÍ UČEBNICE ESPERANTA PRO ČECHY (pouhé 3 roky po vydání první učebnice dr. Zamenhofa). Následně odešel do Prahy, kde vedl první kurz esperanta v hostinci U Pštrosů a věnoval se politické a agitační činnosti. Jeho práce v Omladině, v hnutí pokrokové dělnické mládeže a studentů, nemohla uniknout pozornosti rakousko-uherské policie.


Kiel 18-jara malriĉa studento, vivtenanta sin per redaktado kaj individua instruado, el propraj rimedoj li eldonis en 1890 en la presejo Hoblík en Pardubice LA UNUAN ESPERANTO-LERNOLIBRON POR ĈEĤOJ (nur tri jarojn post eldono de la 1-a lernolibro de dr. Zamenhof). Sekve li foriris al Prago, kie li gvidis la unuan Esperanto-kurson en la gastejo "Ĉe strutoj" kaj okupiĝis pri politika kaj agitacia aktiveco. Pro sia laboro en "Omladina", movado de progresema laborista junularo kaj studentoj, li ne povis eskapi de la atento de la aŭstra-hungara polico.

Po demonstraci za všeobecné volební právo byl Lorenc uvězněn a vyslýchán a obdržel povolávací rozkaz na tříletou vojenskou službu. Rozhodl se, že tajně opustí Čechy a pokusí se využít emigrace českých rodáků do Brazílie, do nejjihnějšího státu Rio Grande do Sul, kde tamější vláda slibovala imigrantům půdu k farmářské činnosti. Zcela bez prostředků se pod jménem syna jedné rodiny, který se kvůli soubence rozhodl neodjet, nalodil v Hamburku na parník "Argentina". Během plavby se naučil základům portugalštiny.



Post demonstracio por ĝenerala balotrajto Lorenz estis malliberigita kaj esplordemandata kaj li ricevis ordonon al trijara soldatservo. Li decidis sekrete forlasi Bohemion kaj provis utiligi elmigradon de ĉeĥoj al Brazilo, al la plej suda ŝtato Rio Grande do Sul, kie tiea registraro promesis al almigrintoj grundon por agrikultura aktiveco. Tute sen rimedoj, sub la nomo de la filo de unu familio, pro sia fianĉino decidinta ne forvojaĝi, li enŝipiĝis en Hamburgo al la vaporŝipo "Argentina". Dum la navigado li ellernis bazon de la portugala lingvo.

Z důvodu povstaleckých bojů nabídka farmaření ztroskotala a imigranti si museli hledat obživu na vlastní pěst. Lorenc vystřídal ve velmi tvrdých podmínkách několik zaměstnání, až se mu konečně podařilo odcestovat do Porto Alegre. Po dramatické cestě vnitrozemím do vznikající vesnice DOM FELICIANO zde začal Lorenz farmařit. Bylo to ale pro nezkušeného Lorenze velmi obtížné, a proto po nějaké době uvítal možnost pracovat jako učitel. Škola se pod jeho vedením dobře rozvíjela a Lorenz byl jmenován jejím ředitelem.



Lorenz jako učitel ve filmu "Muitas vidas" (Mnoho životů)

Lorenz kiel instruisto en la filmo "Muitas vidas" (Multaj vivoj)

Pro ribelbataloj la oferto pri bienumado fiaskis kaj almigrintoj devis serĉi vivtenon propraforte. Lorenz laboris dum tre duraj kondiĉoj plurajn profesiojn, ĝis li sukcesis fine forvojaĝi al Porto Alegre. Post drama migrado al la estiĝanta vilaĝo DOM FELICIANO li komencis tie farmi. Sed por li senspertulo tio tre malfacilis, sekve post ioma tempo li bonvenigis la okazon labori kiel instruisto. La lernejo sub lia gvido prosperis kaj Lorenz do estis nomumita ĝia direktoro.





V Dom Feliciano se v r. 1895 Lorenz oženil s Němkou Idou Krazsewskou a měli spolu 13 dětí. Dvě z nich brzy zemřely. Lorenz adoptoval ještě několik dalších dětí a materiálně podporoval děti, které k němu přicházely na stravu, mezi nimi také jednu černošku.

En Dom Feliciano en 1895 Lorenz edziĝis al germanino Ida Kraszewska kaj ili kune havis 13 infanojn. Du el ili baldaŭ mortis. Lorenz adoptis krome pluajn aliajn infanojn kaj materie subtenis infanojn, kiuj venadis al li por manĝi, inkluzive unu nigrulinon.

Po úmrtí manželky v r. 1944 se v r. 1948 oženil s Franciscou Nalepinski Schumann, s níž rovněž staral o několik sirotků a opuštěných dětí.

Post forpaso de la edzino en 1944 li edziĝis en 1948 al Francisca Nalepinski Schumann, kun kiu li ankaŭ zorgis pri pluraj orfoj kaj forlasitaj infanoj.

Při své starosti o rodinu a hospodářství, práci ředitele školy a osvětové činnosti nacházel ještě po večerech čas a energii na literární činnost, mimo jiné na překlady z české literatury do portugalštiny. To ocenil i prezident T.G. Masaryk. Pozoruhodaná je také Lorenzova práce na záchranu jazyků původního indiánského obyvatelstva zaznamenáním jejich gramatik (pro celkem 24 jazyků).



Krom sia zorgo pri la familio kaj la farmbieno, laboro de la lernejdirektoro kaj kleriga agado li ankoraŭ dum vesperoj trovis tempon kaj energion por literatura aktiveco, i.a. por tradukoj de la ĉeĥa literaturo al la portugala. Tion aprezis ankaŭ la tiama ĉeĥoslovaka prezidento T.G. Masaryk. Rimarkinda estas ankaŭ la laboro de Lorenz por savo de la lingvoj de la origina indiĝena loĝantaro pere de notado de iliaj gramatikoj (entute por 24 lingvoj).

Lorenz hodně překládal také z angličtiny do portugalštiny. Jeho hlavním dílem je překlad Bhagavadgíty ze sanskrtu do portugalštiny a esperanta. Brazilští autoři zaznamenávají, že na konci života **údajně ovládal 80-104 jazyky!**

*Lorenz multe tradukis ankaŭ el la angla al la portugala. Lia ĉefa verko estas traduko de Bhavagadgito el sanskrito al la portugala kaj al Esperanto. Brazilaj aŭtoroj notas, ke fine de sia vivo **onidire li regis 80-104 lingvojn!***



*ukázky Lorencových původních děl v portugalštině
specimenoj de la originaj verkoj de Lorenz en la portugala lingvo*

Jeho dílo obsahuje více než 80 položek, další se možná ještě nacházejí v archívech. Ve svých dílech věnoval pozornost spiritualistické tématice, věnoval se rovněž ezoterním naukám a vykonával s úspěchem i léčitelskou praxi. Je dosud nejasné, jak všechny tyto znalosti získal při svém vytížení a pobytu daleko od civilizace.

Lia verkaro entenas 80 titolojn, pluaj supozeble troviĝas en arkivoj. En siaj verkoj li donis atenton al spiritualisma temaro, li dediĉis sin ankaŭ al esoteraj instruoj kaj li estis ankaŭ sukcesa naturkuracisto. Estas ĝis nun neklare, kiel li ĉiujn ĉi sciojn akiris dum sia labora troŝarĝiteco kaj restado malproksime de la civilizo.

Ve městě DOM FELICIANO (cca 14 000 obyvatel) nyní působí kulturní dům s knihovnou nesoucí jeho jméno. Jsou po něm pojmenovány např. Výzkumný institut v Porto Allegre, ulice v několika brazilských městech a nakladatelství EDITORIAL LORENZ.

En la urbo DOM FELICIANO (ĉ. 14 000 loĝantoj) nun aktivas kulturcentro kun biblioteko portanta lian nomon. Laŭ li estas nomitaj ekz. ankaŭ Esplorinstituto en Porto Allegre, stratoj en pluraj brazilaj urboj kaj la eldonejo Editorial LORENZ.



Lorenz je rovněž považován na zakladatele esperantského hnutí v Brazílii a je zde stále velmi vážen. Je autorem učebnic i překladů beletrie. Vybrané ukázky naleznete v jemu věnované KNIŽNÍ VITRÍNĚ.

Lorenz estas ankaŭ konsiderata kiel fondinto de Esperanto-movado en Brazilo kaj li estas tie daŭre tre estimata. Li estas aŭtoro de lernolibroj kaj beletraj tradukoj. Plurajn vi trovos en LIBROVITRINO, dediĉita al li.

V r. 2012 za přítomnosti zástupců českého velvyslanectví v Brazílii byly do Dom Feliciano přeneseny z Porto Allegre Lorencovy ostatky a byl mu zde zřízen pomník.

En 2012 en ĉeesto de la reprezentantoj de la ĉeĥa ambasadorejo en Brazilo estis el Porto Allegre al Dom Feliciano transportitaj korprestaĵoj de Lorenz kaj estis tie starigita monumento omaĝe al li.



potomci F.V. Lorenze - posteuloj de F.V. Lorenz

Lorenz patří mezi tři nejznámější osobnosti Brazílie s českým původem. Jsou to bývalý prezident Juscelino Kubitschek de Oliveira, podnikatel Jan Antoním Baťa a právě Lorenz. Jeho dramatický život, rozsáhlé dílo a život naplněný filantropií zasluhuje větší pozornost v jeho původní vlasti než tomu bylo dosud.

Lorenz apartenas al tri la plej konataj ĉeĥdevenaj eminentuloj de Brazilo. Temas pri la eksprezidento Juscelino Kubitschek de Oliveira, entreprenisto Jan Antonín Baťa kaj ĝuste Lorenz. Lia dramoplena vivo, ampleksa verkaro kaj vivo plenigita per filantropio meritas plian atenton en lia origina patrujo ol estis ĝis nun.